KER

# Virinoj tut-KER-e ekzamenis virojn

Katalin Kováts




Kun iom da ekscito komenciĝis la 7-a Tutmonda Ekzamentago la 16-an de junio 2018. La 48 testoj, senditaj poŝte al la kandidatoj en Seulo, ne alvenis al la celloko. Inter Nederlando kaj Koreio ne sufiĉis 5 semajnoj por tiu vojaĝo, kvankam samtage sendita pakaĵo ene de 5 tagoj atingis Japanion.

Nia juna surloka organizanto, Inhye Gim (Ella), kun helpanto bone sekvis la B-planon kaj kun sekurpaŝoj multobligis la testojn la antaŭan nokton.

Bonŝance la ekzamentago pasis bone, nur kun unu eraro, do, la ĉeforganizanto, Katalin Kováts, de *edukado.net* kaj la ĉ. 40 aliaj, plejparte lokaj kunlaborantoj bone faris sian laboron.

La baza ideo de la tutmonda ekzamentago estas, ke samtage, samhore, oni malfermas la testkovertojn en diversaj partoj de la mondo. Al la unua grupo apartenis ĉi-jare Londono, tri francaj urboj: Parizo, Tuluzo kaj Fleury les Aubrais, la svisa La Chaux-de-Fonds, tri ĉinaj urboj: Zaozhuang, Guangshou kaj Ĉenduo, en Japanio Tokio kaj Ŝimonoseki kaj la plej multnombra ekzamenloko, la korea Seulo.

Al la dua turno apartenis Novjorko kaj Piedmont el Usono, Montrealo el Kanado, la kolombia urbo Bogoto kaj en Brazilo Recife. En tiuj lokoj oni ricevis alian testserion kaj komencis la laboron kune, sed pli malfrue ol la unua grupo.

Preskaŭ ĉie okazis nur skribaj ekzamenoj, nur en Svislando, Londono kaj Novjorko la kandidatoj povis trapasi ankaŭ la parolajn partojn. Ili estis ligitaj pere de reto al Nederlando kaj al Budapeŝto, kaj en tiu ĉi triangulo Katalin Kováts kaj Márta Kovács ekzamenis la kandidatojn. Kaj jen la unua ligo al la titolo, kiun vi eble mislegis unue. Okulfrapas, ke ne nur la du ekzamenantoj estis virinoj, sed ankaŭ multaj lokaj organizantoj estis inaj. Sed eĉ pli okulfrapas, ke en pluraj lokoj ekzameniĝis nur viroj, kiel ekzemple en la du japanaj urboj, en Londono, Parizo, Montrealo, (sub la organizado de du virinoj!), en Piedmont, kaj ankaŭ en la aliaj urboj estis multe malpli da inoj ol viroj. Nepre analizenda fenomeno!

Entute 153 personoj aliĝis al la ekzamenoj por tiu tago kaj bedaŭrinde 18 personoj fine ne aperis en la ekzamenoj. Estas granda vario en la nombro de kandidatoj: en Koreio fine ekzameniĝis 38 personoj kaj en Kalifornio nia ekzamenanto iris al la hejmo de unu junulo kaj okazigis kvazaŭ privatan sesion.

Kompare kun la jaro 2012, kiam samaranĝe ekzameniĝis 326 personoj, tiu nombro ŝajnas malgranda, tamen observeblas kresko rilate al la lastaj 4 jaroj.

En la 10-jara historio de la KER-ekzamenoj ĝis la fino de 2017 sukcese ekzameniĝis 2012 personoj, kaj al tiu sumo en 2018 ni povas jam aldoni preskaŭ 200 novajn diplomitojn, ĉar ekde aprilo okazis sesioj en Greziljono (FR), Moskvo (RU) kaj Kuritibo (BR).

Sume ĉirkaŭ 100 pliajn kandidatojn ni atendas dum la sesioj en Raleigh (dum NASK), Liptovský Mikuláš (dum SES, Slovakio), Lisbono (UK), Badajoz (IJK), San-Marino (Itala Kongreso), Poznań (ARKONES), en Kotonuo (dum la unua sesio en Afriko!) kaj en la meksika urbo Puebla de Zaragoza.

La jara kandidatnombro nun estos duoble pli granda ol en la pasintaj jaroj. La ekzamena komisiono kaj UEA tre ĝojas pro la progreso, kaj esperas, ke la akiro de KER-atestiloj fariĝos celo de multaj esperantistoj kaj ankaŭ la movadaj organizaĵoj aprecos tiujn strebojn, ĉu per faciligoj al la diplomitoj, ĉu per rekta subvenciado, kiel tio okazas ekzemple en Britio, Italio, Francio kaj en kelkaj aliaj landoj.

Revene al la nuna ekzamentago ni povas diri, ke la testojn oni poentumos kaj la atestilojn produktos en Budapeŝto. Se ĉio iros bone, la dokumentojn, kune kun tiuj de la pli fruaj ĉi-jaraj sesioj, ni povos disdoni en Lisbono, dum la kongresa ekzamentago.

Se iu emas aliĝi al iu sesio aŭ ŝatus okazigi ekzamenojn sekvontjare, nepre vizitu la paĝon *https://edukado.net/ekzamenoj/ker/sesioj* aŭ skribu al *ker-ekzamenoj@edukado.net*.

Ni dankas al ĉiuj kunlaborintoj kaj kore gratulas la kuraĝajn ekzameniĝintojn!

